# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 15/07/2021 Kvincenttrideknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 279,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 229,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 203,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 99,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde novembro 2021)

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *


*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 43 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:




1). En la subfrazo de la kombinita propozicio (= frazo) " En la dek minutoj, DUM KIUJ la manĝema knabo manĝis la kukon rapide, li sukcesis manĝi la tutan kukon kun gusto", "la knabo" estas la gramatika subjekto. Kio estas en la subfrazo la gramatika objekto, kaj kia frazparto estas "DUM KIUJ"?

2). En la ĉeffrazo de la kombinita frazo en N.ro 1), **A**), kio estas la gramatika objekto, **B**). kia frazparto estas "EN LA DEK MINUTOJ DUM KIUJ LA MANĜEMA KNABO MANĜIS LA KUKON RAPIDE", kaj **C**). kiaj frazpartoj estas "sukcesis manĝi" kaj "la tutan kukon" kaj "kun gusto"?

3). En la frazo "Dum dek jaroj li ĉiam estis fidela amiko, kiun mi ĉiam povis fidi" kiu vorto estas la antecedento kaj kiu vorto estas la rilata pronomo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 539. *Marcel Leereveld.*

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Sociaj kontaktoj en la ĉiutago feliĉigas

**8a Julio 2021**

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

*Roger Springer*

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

## El Adelajdo



Brendan kaj Carol Linnane

La 7-an de julio la adelajdaj esperantistoj aŭskultis dum sia kunveno Brendan Linnane, kiu parolis pri la dekstra kaj maldekstra trafiko en la mondo. Kun surprizo ni lernis de li, ke unu triono de la monda loĝantaro uzas la maldekstran flankon. Temas plejparte pri la iamaj britaj kolonioj. Verŝajne la unua leĝa postulo pri kiuflanke de la strato veturi aperis en 1765. Kelkaj el la ĉeestantoj pruntis E-legaĵojn de Charles Stevenson, kiu alportis stoketon de libroj el la kluba biblioteko.

Paul Desailly gardanta la lingvon kun sia krokodilo!

*Katja Steele*




***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# La kanto Donu al mi vian manon

Franciska skribis, ke kiam ŝi serĉis la kanton Donu al mi vian manon, ŝi trovis filmeton "Donu al mi vian monon". Nu mi provis gugli, kaj Google tuj donis al mi ligon kun la tuta teksto de la kanto, vidu [http://kantaro.ikso.net/donu_al_mi_vian_manon_amiko](http://kantaro.ikso.net/donu_al_mi_vian_manon_amiko) Amike, *Nicole Else*

# Nova bildlibro







Mi ĵus ricevis la belan novan bildlibron "*The word for friend*" de Aidan Cassie. Juna Kemala translokiĝas al alia lando en kiu alia lingvo estas parolata. Unue ŝi nenion komprenas, sed iom post iom ŝi lernas tiun lingvon kaj amikiĝas kun la infanoj tie. Tiu alia lingvo estas Esperanto. La aŭtoro mallonge klarigas je la fino de la libro kio estas Esperanto kaj skribas, ke ŝi elektis Esperanton, ĉar ĝi ne estas la lingvo de specifa lando kaj do la rakonto povus okazi en iu ajn lando. Amike, *Nicole Else*



# Mafrua alveno

**Kara Roger!**

Hodiaŭ estas Ĵaŭdo, kaj mankas al mi mia “Aŭstraliaj Esperantistoj”! Antaŭ nur malmultaj minutoj mi vidis ĝin sur mia ekrano, sed nun, kiam mi deziras elpresi ĝin, ĝi estas nenie videbla. Mi esperas ke mi ne ofendas vin, se mi elkore petas, eĉ petegas vin, resendi ĝin al mi. Mi treege ŝatus sidi kaj legadi ĝin en la buso survoje al Adelajdo ĉi tiun matenon!

Mi esperas ke vi fartas bone, same kiel mi!

Plej amike, *Bob Felby*

**Kara Roger**!

Pardonu min, la plej bona gazeto en la mondo revenis al mi. Mi jam elpresis ĝin por sidi kaj legadi ĝin en la buso.

Bonvolu akcepti miajn plej elkorajn salutojn kaj dankojn ĉar vi estas unu el la plej bonaj homoj en la tuta mondo!

Plej amike, *Bob Felby*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# GRATULOJ

Gratulojn al Marcel Leereveld pro lia artikolo "Mi akuzas" en AE 538 (5a Julio 2021) pri la Iraka Milito, 2003 to 2011.
Mi eksciis ion, kion mi ne memoris.
La tri atakantaj nacioj – Usono, Unuigita Regno, kaj Aŭstralio, diris ke la diktatoro Saddam Hussein akiris atomajn armilojn. Ili havis solan atestanton. Li estis mensogulo.
Dum multaj jaroj mi pensis ke la tri ĉefaj personoj devos aperi antaŭ la Monda Juĝistaro, akuzitaj de militaj krimoj.

- *John Massam*, Okcidenta Aŭstralio, 8a Julio 2021

## Mon-avido, Stulteco, kaj Superstiĉo malhelpas la homaron.

"Neniam oni provos, se ĉiuj eblaj obstakloj unue devas esti venkitaj." SAMUEL JOHNSON



**Owen Loneragan** meritis la epiteton, eble iom malnoviĝinta, "ĝentlemano". Mi renkontis lin nur dum kelkaj kongresoj/someraj lernejoj, kaj kiam Katja kaj mi vizitis Perton antaŭ kelkaj jaroj, ni renkontis grupon ĉe lia domo. Sed mi povas diri, ke li ĉiam estis bonhumora, afabla kaj sindediĉa Esperantisto. Li moviĝis iom malrapide, li ne ĉiam tuj trovis respondon al demando, sed lia larĝa rideto elradiis amikecon.



Owen atingis grandan aĝon, kaj mi esperas, ke li restis ĝisfine en relative bona stato, kaj ke lia transiro estis milda kaj sendolora. Vale, Owen, *ĝentlemano*!
*Trevor Steele*

Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko) ensalutu • registru vin

## Tre karaj, bonvenon diskonigi kaj partopreni la konkurson Mondovizio!

Kunhavigu vian talenton kun homoj el la tuta mondo! Okazinta la unuan fojon dum la reta IJK de 2020, la konkurso Mondovizio, kun siaj belegaj kaj ĉarmaj prezentantoj, revenos por la 2-a Virtuala Kongreso! Ĉi tiu 'juvelo en la krono' de la junulara programo de VK aspektas kiel tradicia internacia vespero, sed estas pli moderna, pli internacia kaj pli konkurenca ol vi imagas! Ĉu pere de kanto, laŭtlegita poemo, teatraĵo aŭ eĉ montrado de mankreaĵo – ni volas viajn talentajn kontribuojn kaj bonvenigas ĉiun! Kaj plej grave, la plej bonaj kontribuoj ricevos misterajn ekskluzivajn premiojn! Nepre sendu vian kontribuon per *WeTransfer* al jupo@vk.esperanto.net antaŭ la 21-a de Julio. Ariel Bonkorpa, Siru Laine kaj Tyron Surmon prezentos! Manuela Burghelea ĉefgvidas la junularan programon (JuPo) de VK!

Ĉu vi volas subteni TEJo-n? Fariĝu Patrono! https://uea.org/alighoj/alighilo

Kore, *Fernando Maia Jr.* **Universala Esperanto-Asocio** | Vicprezidanto

## Universala pensio nuligus multajn taskojn de la policoj.

Poste la policoj ree estus ĉies amikoj *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## De kiam venis la 3 reguloj por protekti nin kontraŭ Covid-19 –

Ĉu vi scias? 1 Socia distanciĝo 2. Lavu viajn manojn 3. Uzu maskojn
Ni trovas ĉi tion en la Biblio - antaŭ 3500 jaroj oni diris al la homoj de Israelo:
1. Exodus 30: 18-21 Lavu viajn manojn
2. Leviticus 13: 4,5,46 Konservu vian distancon, kovru vian buŝon kaj evitu ĉian kontakton
3. Leviticus 13: 4,5 - Iu infektito restos en kvaranteno de 7 ĝis 14 tagoj
Dankon al Dio pro la bibliaj principoj Amike *Janusz Wolak*






Dekduo da esperplenaj Esperantistoj kaj gastoj renkontiĝis refoje la Brizbana Biblioteko por klaso, diskuto, plano, raporto.
Ni ankaû konsiliĝis pri ESPERANTO TAGO kaj planos viziti faman Eûropan ekspozicion de pentraĵoj en la galerio apud la "Brizbana Rivero
Poste ni havos tagmanĝon proksime.
Kiam ni povos havi normalan monatan kunvenon. Ĉiu bonvena!
Ankaŭ ĝuu la Belaj Rododendroj en la ĝardeno de mia amiko.
*PetroDanzer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVO DE LA KVIZETO 42**

1). La gramatika objekto en la subfrazo estas “la kukon”, kaj “DUM KIUJ” estas la rilata pronomo.
2). A). La gramatika objekto de la ĉeffrazo estas “la kukon”, kaj B). Tiu tuta frazparto estas adjekto,
kaj C). “sukcesis manĝi” estas la predikato (verboj), “la tutan kukon” estas la objekto, kaj “kun gusto” estas adjekto.
3). La antecedento estas “amiko” kaj la rilata pronomo estas “kiun”. *Marcel Leereveld.*

**3ZZZ**.... En la elsendo de la 12a de julio 2021 eblas aŭdi Marcel legi la tekston, kiun li publikigas en ĉi tiu numero de AE kaj ekscii pri multaj movadaj eventoj.



*Franciska Toubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Kvarantena Stacio en Norda Terkapo, Manlio

tre proksime al mia domo en Manlio.
De la fruaj 1830-aj jaroj ĝis 1984, preskaŭ 16,000 homoj pasis tra ĝiaj pordoj.
Nun ĝi estas parto de nacia parko, turista loko kaj enhavas komercan privatan hotelon.

**Sed mono regas la mondon.**

La registaro konstruos novajn kvarantenajn staciojn aliloke.
Nia popolo ree pagas por la neantaŭa planado de nia registaro. Do ne gravas estas kutime
*Roger Springer*



(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*)



# K i e n o s l a k a p i t a l i s m o ?

**LA MARKSISMO.**

Antaŭ unu kaj duona jarcentoj la germanaj sciencistoj Karl Marx kaj Friedrich Engels ellaboris en sia libro "Das Kapital" ("La kapitalo") la tiaman kaj estontan disvolviĝon de la ekonomia sistemo nomata kapitalismo. Ĝia klarigo de la sistemo ne estas refutebla. Ankaŭ la prognozo aspektas efektiva, sed okazis kaj okazos intervenoj de la grandaj kapitalismaj kompanioj, kiuj intervenoj plu daŭrigas la vivon de la sistemo. Tamen ĉiuj scias, ke la precipa disvolviĝo dependas de la naturo kaj de neatenditaj okazoj, kiel nun la eksplodo de la virusoj.

Marx kaj Engels ne nur priskribis la kapitalismon kaj ĝian estontecon, sed ankaŭ, en sia "Komunista manifesto", admonis al la homaro jam nun labori, ke ĉe la fino de la kapitalismo oni estos preta starigi pli humanan ekonomion kaj societon ol estis la tiama socio. Ili asertis ke tio nur eblas, se la laboristoj kaj kulturistoj prenas la potencon en siajn proprajn manojn kaj daŭre decidas mem kion produkti kaj kiom, kaj kion kaj kiom interŝanĝe ricevi el la socio. Por tion ellabori la laboristoj bezonos tempon kiel parton de sia laboro. Ĉiu kundecidas, sed sampotence kiel la aliaj. La Manifesto ankoraŭ atendas, ke la politikaj komunistaj partioj donos tiun egalecan potencon al la laborejaj komitatoj. Tiu principo jam akceptiĝis en la komenco de la ruslanda revolucio post la unua mondmilito.

Sed la rusa gvidisto Lenin decidis, ke la komunistaj partioj estus pli kleraj fari tion, anstataŭ la laboristaj komitatoj ("sovetoj"). Pluraj komunistoj ekvidis tiun ŝanĝon de opinio, kaj avertadis Lenin kaj la mondon ke tiu ŝanĝo rezultus en la diktaturon de la komunista partio, ne en la egalecan potencon de la laboristoj mem. Du famaj tiaj estis Liebknecht kaj (Rosa) Luxemburg. Ili multe agitis por ŝanĝi tiun evoluon en Rusujo kaj ĉie. La komunista partio de la germana urbo Hamburgo ankaŭ vidis la danĝeron, kaj sendis sian spertulon Johann Appell al Lenin por konvinki tiun ĉesigi la tendencon. Sed Lenin estis obstina defendi la potencon de la komunistaj partioj. La rezulto estis pli organizita movado por propagandi la veran, laboristan, komunismon. En Nederlando tiun propagandon direktis precipe la astronomia profesoro

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Antoon Pannekoek kaj lia studisto Bruun van Albada, poste astronoma profesoro en Indonezio. Ekzistis similaj grupoj en aliaj landoj, sed ili ĉiuj estis malfortaj.

La germana registaro konkludis ke la marksisma ideologio estis pli danĝera ol la partia komunismo, kaj tial ĝia sekreta polico murdis Luxemburg kaj Liebknecht. Ili ankaŭ deziris mortigi la konatan marksiston Johann Appell, kiu fuĝis al Nederlando kaj sukcesis resti netrovebla. Ankaŭ la rusa sekreta polico serĉis lin. Li kelktempe kaŝis sin en la domo de miaj gepatroj, kiuj ne konatis kiel komunistoj aŭ marksistoj. Ankaŭ Lanti de S.A.T., kvankam ne pura marksisto, malamatis de la rusa registaro.

En 1936 mi enkondukis Esperanton en la marksisman movadon, kaj starigis en S.A.T. frakcion kiu ĉiumonate eldonis dudekpaĝan gazeton pri marksismo, nomatan "Klasbatalo", ne aperanta dum la milito. Ĉar mi neniam estis membro de la oficiala komunista partio, la germana sekreta polico ne serĉis min. Mi cetere ne trovatis por sendati al Germanujo por tie labori. Ne plu loĝante en Eŭropo, mi ne scias ĉu plu ekzistas tiaj marksismaj movadoj. Kaj mi eksiĝis el S.A.T. pro ĝia lingvisma diktatoreco. Sed miaj marksismaj artikoloj aperis regule en la gazeto de Kribo, nome "Laŭte!". La aŭstralia sekreta sekurecinstanco ne kontraŭis mian enmigradon, ĉar laŭ ili "La komunistoj estis la plej patriotaj aŭstralianoj". *Marcel Leereveld.*

**VJETNAMUJO.**

La vorto "Vjetnam" signifas "Homo el(de) la sudo (por ĉinoj)". Do la Esperanta vorto "vjetnamo" signifas "homo"n, ne "landon". Ĝi signifas en Esperanto "homo kiu loĝas en Vjetnamujo", malgraŭ tio kion diras la angla kiu prenis la vorton el la franca, uzata en la usona kanto pri vjetnamino: "the Vjetnamienne". *Marcel Leereveld.*

## Kio estas Mono? Ĉu mono estas la havebla energio en la mondo?

Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp. aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?
La bankmonoj (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligitaj al energio, Ili devas egali al energio.
Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la Inflacio kaj malinflacio kontrolas tion.
Do la monda problemo estas kiel ĝuste dividi tiun monon inter la Homaro por ke ĉiuj povu vivi feliĉe.

Multaj homoj hodiaŭ laboras laborojn, kiujn ili ne ŝatas, por aĉeti aferojn, kiujn ili ne bezonas, por ke ili povu impresi homojn, kiujn ili ne ŝatas. Sed fine de la vivo ĉi tiuj homoj profunde bedaŭros pasigi sian vivon provante impresi aliajn homojn. Estu humila kaj serĉu impresi vin nur. Lasu aliajn homojn zorgi pri ĉasado de statuso. Ĉi tiu perspektivo estas ege liberiga.

# Universala baza enspezo (UBI)



## Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.

## Tio helpos solvi multajn nunajn problemojn de la tuta homaro *Roger Springer*

La problemo ne estas de kie venas la aĵo por vendi, sed kiuj havas monon por la aĉetado!

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***